INFORMOJ

Plenkunsido de Centra Laborrondo

La 26an kaj 27an de oktobro 1974 Centra Laborrondo havis sian ĉijare trian laŭvican plenkunsidon, ĉifoje en Leipzig. La riĉa tagordo i. a. antaŭvidis prijuĝon de la 1974 farita laboro kaj la planadon de la 1975 antaŭstarantaj taskoj. Vigla diskuto kaj raportado de la estroj de DLR-oj evidentigis, ke 1974 ĝenerale estis tre sukcesa jaro, tiel donante bonan starton por 1975. Speciale ĝojinde estas, ke plimultiĝas iniciatoj vigligi kaj vastigi la junularan laboron. Por 1975 estas planata speciala seminario por junulaj gviduloj kaj la novfondo de la Junulara Komisiono ĉe CLR.
Krome partoprenintoj de la 30a TEJO-konferenco (Münster/FRG) kaj de la 59a Universala Kongreso de UEA (Hamburg/FRG) donis raportojn. La multhoraj tre konkretaj traktadoj kaj viglaj diskutoj ankaŭ evidentigis plian fojon la grandan laboron, kiun multaj esperantistoj kun plej alta sindediĉo faras en sia libertempo. Pro tio la prezidanto de CLR, Rudi Graetz, esprimis sian plej koran dankon pro la farita laboro. Per glaseto da vino oni tostis je la jubileo de la respubliko optimisme alironte la novajn taskojn.

El Cheb

La Esperanto-grupo de la subdistrikto Auerbach interkonsentis kun esperantistoj el Cheb (ĈSSR), por profundigi najbarajn kaj amikajn interilatojn, renkontiĝon en Cheb la 21an kaj 22an de sept. 74. Ni konatiĝis helpe de sperta gvidado kun la bela historia urbo kaj vizitis vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵo. Dum komuna vespero ni interŝanĝis spertojn pri la evoluo de ambaŭ landoj kaj pri la Esperantolaboro. Unuece decidita komuna protestrezolucio temis pri la fiaj atakoj de la nelegitima registaro en Ĉilio.

Grimm



Jen la unua multkolora turisma prospekto pri urbo de GDR. Ĝi estas por GDR-anoj havebla kontraŭ 50 fenigoj ĉe Centra Laborrondo.

Eksterlandanoj ĝin petu ĉe Rostock-Information, DDR-25-Rostock, Lange Straße 5.

Robert Veigel 70jara

La 6an de Julio 1974 la merita laborista esperantisto Robert Veigel, prezidanto de DLR Suhl, fariĝis 70jara. Ni tre kore gratulas al la jubileinto postdate, dezirante al li ankoraŭ multajn sanajn kaj viglajn jarojn. *CLR*

Johannes R. Becher-medalo en oro

La plej altan distingon de la Kulturligo de GDR, la supre menciitan medalon, okaze de sia 65-jara vivojubileo ricevis *Ludwig Schödl*, membro de Centra Laborrondo. Ni tre kore gratulas.

Flirtĉemizo por Ursula

Ralph Wiener

En respektinda ĵurnalo mi legis antaŭnelonge jenon:

„Viroj, kiuj aĉetas noktĉemizon por virino, kondutas tiel, kvazaŭ temas pri aĉeto de narkotaĵo aŭ kontrabanditaj cigaredoj.“ Mi neniel volas kontesti tiun aserton. Ĝi estas komplete ĝusta. Sed kio estas la kaŭzo, ke ni tiel strange kondutas dum la aĉeto de virina noktovesto? Ĉu estas la kaŭzo en ni? Neniel. La vendistinoj estas kulpaj! Lasu min raporti: Estas kutima tago. Nur iom pli varme. Kaj tial en mi suprengrimpis la ideo, aĉeti flirtĉemizon por Ursula. En varmaj tagoj oni ĝuste ekhavas ideoin, kiuj ĉe pli freŝa temperaturo neniam estus atinginta la supraĵon de nia konscio. Krome Ursula estis knabino, kies aspekto rekte kriis al flirtĉemizo, kaj ŝi havis — sed mi forlasas la temon.

Do mi eniris la modvendejon „Elegant“ kaj direktis min al la vendistino demandante tute senemocie, kvazaŭ temus pri la plej naiva afero de la mondo: „Flirtĉemizon, mi petas!“ — „Kiu grando?“, demandis la juna sinjorino. Mi ekhezitis. „Ja, kiamaniere mi devas klarigi al vi?“ mi redonis. „Kvardekdu? Kvardekkvar? Kvardekses?“ Ni lasu la nombrojn!“ mi rezignis. „Pri tio mi tute nenion scias.“ „Eble vi antaŭe demandos vian edzinon?“ rimarkis la senkulpa vendistino. „Tio apenaŭ estus la ĝusta vojo“, mi respondis, „mi ne havas edzinon“. „Jen, ja“, ŝi kvitancis lakone kaj tiris kelkajn diafanajn robojn el la bretaro. „Kiun alton havas la sinjorino?“ Mi pripensis.“ Tion diri estas malfacile“, mi flustris, „ŝi estas tute normala. Proksimume tiel kiel vi. Tio signifas, ĉie ne estas tiel. Ekzemple...“ mi hezitis. La vendistino ekatentis. „Ekzemple?“

„Ekzemple ŝi havas Butterfly-hararangon, ne harplektaĵon.“ „Jen, ja“, ŝi diris kaj ĉifoje sonis iom elreviĝite. — Mi provis ŝin psike restarigi. „Sed la alia ĉio estas kiel ĉe vi“, mi certigis kaj kliniĝis diskrete trans la vendejotablon. „Eĉ la kruroj estas ĝustaj.“ La vendistino malfaldis kelkajn flirtĉemizojn antaŭ mi. „Nun restu afereca!“ mi murmuris al mi. „Gardu dignon! Kondutu korekte!“ „Kian koloron vi rekomendus al mi?“ mi demandis sensuspekte. „Tio dependas de la sinjorino“, klarigis la vendistino. Ĉu ŝi estas malhela?“ „Ne, blonda“, mi redonis. „Ĝuste kiel vi!“ „Tiam mi rekomendus al vi rozan“ ŝi konsilis fakule. Mi skuis mian kapon sendecide. „Mi ne scias. Mi tute ne povas imagi ĉi tion.“ „Mi petas!“ ŝi diris kaj tenis la flirtĉemizon al si. „Ĉu ĝi ne plaĉas al vi?“ kaj kiel ĝi plaĉis al mi! Ĝi plaĉis al mi tiel, ke mi diris: „Nu, montru al mi do ankoraŭ alian!“ Ĉe la sekvanta ŝi klarigis kaj tenis ŝian manon ĉe la koncerna loko, „kaj pro la pli bona komforto la bendon oni povas malfiksi laŭplaĉe. Krome oni povas flanke...“ — Kion mi devas rakonti ankoraŭ! Naŭ ĉemizojn ŝi tenis al si ankoraŭ, kaj kiam mi decidis por la deka, mi tute estis forgesinta, ke ĝi estis destinita por Ursula. Mi donacis ĝin al la vendistino.

Sed kiel mirigita mi estis, kiam post kelkaj tagoj ĉe Gisela — tiel estas nomata la vendistino — mi vidis kuŝi en la tolaĵŝranko ĉirkaŭ dudek flirtĉemizojn. „Stultĉjo!“ ŝi trankviligis min. „Pro kio vi ekscitiĝas tiel? Ĉu vere vi pensis, ke vi estis la sola, kiu volis aĉeti flirtĉemizon ĉe mi?“

El „Das Magazin“ 12/1969, Tradukis Gerhard Winter

La potenco de skriba preparo

de Ralph Wiener

Ilfaristo Maks Prilvic apartenis al tiuj homoj, kiuj parolas malkaŝe. Eĉ dum mallonga referaĵo.
„Tio ne taŭgas“, iun tagon estro Stankovajt diris al li. Volante referi mallonge pri la mondpolitika situacio, oni minimume elverkas skriban prelegskizon. Sed kion vi faras? Vi parolas el la vento!“
„Tiel estas“, jesis cirklestro Kramer. „Referaĵo sen skriba preparo entute ne estas referaĵo. Vi ne profunde preparas vin, kolego Prilvic!“
Maks Prilvic provis pravigi sin. „Ni ne estu formalismaj“, la skizon oni povas kaj devas havi en la kapo. Krome oni parolas tute alimaniere ol oni skribas. Legataj referaĵoj ofte lacigas la aŭskultantojn . . .“
Laŭtaj protestoj interrompis lin: „Aĉaj pretekstoj!“ „Li timas la fonto-plumon“. „Pli da scienceco, kolego!“
Maks Prilvic timigite kapjesis.
Semajnon poste li zorgeme metis profunde ellaboritan skriban prelegon sur la pupitron. Tiam li voĉlegis sian mallongan referaĵon: „Niaj taskoj vide al la balotoj“ kun akcentado de ĉiu unuopa vorto.
Estro Stankovajt entuziasme kapjesis kaj kore aplaŭdadis. „Belege“, li kriis. „Oni sentas la ekzaktan preparon“.
„Tia perfektaĵo ne atingeblas en libera parolado“, konsentis cirklestro Kramer.
„Preparo restas preparo“, vokis uzinestro Kraushar. Maks Prilvic diris tute nenion. Li malrapide fermis la aktujon kun la kuir-receptoj de sia edzino kaj iris el la kultursalono, kronita per la famo de vera sciencisto.

Trad. M. Lennartz, el Start 12. 9. 1974

Vortludoj: Kiu ANO ne estas homo?
Kiu ARBO kreskas sur la haŭto?
Kiu AJLO ne estas digestebla?
Kiu AMO ne estas dolĉa?
Kiun AMANTON ŝatas ĉiuj virinoj?
Kiu AĜO neniam utilas?
Kiun ANON oni ĉiam piedpremas?
Kiu ANKRO ne havas ĉenon?
Kiu ARIO ne estas agrabla?
Kiun BETON oni digestas per la cerbo?
Kiun BENON bezonas kudristino?
Kiu KUZO ne estas ŝatata?
Kiu KANTISTINO ne bezonas voĉon?
Kiu JAKO varmigas tutan korpon?
Kiu LANDO estas plena da floroj?
Kiu LAGO ne enhavas akvon?
Kiu LOKO balanciĝas en la aero?
Kiu ORO povas paroli?
Kiu LADO moliĝas tre facile?

Solvoj de la vortludoj:

Vortludoj: La ban-ano; la b-arbo; la n-ajlo la cin-amo, la diamanton; la dom-aĝo; la kalk-anon; la k-ankro; la mal-ario; la alfa-beton; la bo-benon; la a-kuzo; la bro-kantistino; la kon-jako la gir-lando; la f-lago; la f-loko; la a-larmo; la akt-oro; la ĉoko-lado.

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

Gelernantoj (12 — 14jaraj) dez. koresp. Skribu al s-ro Dimitâr Pétkov Stojanov, **Gorna Orjahovica,** str. Vastaničeska 1
Kun gesamideanoj el Potsdam dez. kor. anoj de Esp.-societo „Libero", str. „9. septembro" 97, **Ruse**

ČSSR

Fakulo de eksterlanda komerco k. kunlaboro, 40jara, dez. kor., interesiĝas pri muziko, literaturo, kantado en kanthoro, filatelio, geografio. Libor Matějka, Pekařská 68, **602 00 Brno**

GDR

Junulino, 17jara, dez. koresp. Carmen Gersten, **DDR-9202 Frauenstein,** Wassergasse 5 b
Junulino, 16jara, dez. koresp. Roswitha Berger, **DDR-9202 Frauenstein,** Platz des Friedens 5
Junulo, 25jara, serĉas interŝanĝemulojn por pm de ČSSR, Sovetunio, Anglio, Hispanio, Italio, Danio, Norvegio, Svedio, Grekio, Esp.-temo. Kol. bk el la tuta mondo. Manfred Kirsch, **DDR-74 Altenburg,** Kurt-Pester-Straße 21
Komencanto, 36jara, dez. kor. pri ĉ. t. kun ĉ. l. Günter Walz, **1952 Altruppin,** Kirchplatz 2 a

Hungario

Studentino, 19jara, dez. koresp.. kun gejunuloj Elizabeto Zékány, Kalap u. 15, **H - 6800 Hódmezövásárhely**
Lernanto, 17jara, dez. kor. kun gelernantoj el ĉiuj landoj, kol. bk, bm, etikedojn, alumetetikedojn kaj portretojn de gefilmaktoroj. Francisko Szilvási, **4320 Nagykálló,** Táncsics u. 22
Lernanto, 12jara, dez. kor. kun geknaboj el GDR. Kalmár Melinda, **9026 Györ,** Gyöngy u. 12
Rabotisto- 21jara, dez. kor. kun 19jara germana fraŭlino, pri literaturo, poezio, muziko, ŝatas sporti, vojaĝi, kol. pm, bk, gram. diskojn. J. O. Rajnai, pf. 29, **2045 - Torokbalinto**

Soveta Unio

Instruistino, 30jara, dez. koresp. kun gesamideanoj el tuta mondo, interesiĝas pri libroj, bk, pm. Eleonora Koneva, **424025 Joŝkar-Olo,** pk. 12
Gelernantoj el Meza lernejo N 150, Esperanta KJD, **Doneck 340 074,** dez. kor. kun amikoj el tuta mondo
Lernanto, 15jara, dez. kor. kun sam. el tuta mondo. Silič Aleksandr, poste restante, **Doneck - 340066**
Endel Pajula, **202830 Ambla,** Paide raj Estonio, dez. kor. pri seriozaj temoj kaj interŝanĝi esperantlingvan literaturon
Abituriento, 17jara, dez. kor., interesiĝas pri biologio, filmoj, sporto, pentrado, estradaj kantoj, akvariaj fiŝoj, **452620 Baŝkirio,** u. Oktjabrjsky, avenuo de Lenin, d. 58, ĉ. 170 Frolov, Leonid
Studento en Ped.Inst.fak. de pentro, 22jara, dez. kor. kun esp. el tuta mondo, interesiĝas pri moderna muziko kaj pentrarto. Vitaliy Chizhov, Sestrorekaja 8—9, **Leningrad P - 183**
Gejunuloj el Esperanto-Interklubo „Ora Pordego", **SU - 252003 Kiev - 3,** Vladimirskaja 45, Dom Učenih, dez. kor. kun gesamideanoj el GDR
Maristo (navigisto), 21jara, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t. Boris Samojlenko, **Tallinn - 200 001,** poste restante, Estonio
Studento, 20jara, dez. kor., interesiĝas pri lingvoj, literaturo, turismo, interŝ. esperantaĵojn, bk, diskojn, Aleksandro Kalaŝnikov, **625 009 Tjumen,** abonkesto 23
Matematikisto, 29jara, dez. kor. kun esp. el GDR, interesiĝas pri literaturo, filozofio, fremdaj lingvoj kaj vivkutimoj, kino, moderna muziko, aŭtoturismo kaj fotografio, kol. insignojn kaj bk, Viktor Dubrov, Ab. jaŝĉik 101, **Krasnodar 350 000**
Lernantino, 16 jara, kol. pm, kun lernantinoj el la tuta mondo. Laimius Straznickas, **Stakliškes,** Prienu raj. Litovio
Pri literaturo, historio, esperantaĵoj, ex libris, bk. Edgar Homič, ab. jâ. N. 4, **350000 Krasnodar**
Knabino, 14 jara, kol. pm, insignojn, bk, artajn kartojn, gramofondiskojn, kaj knabino 15 jara. Aldona Kaveckaite kaj Virketite Dana, **Varduvos p. 235644,** Rotinenu k. Plunges raj. Litovio
Juristo, 44 jara, Elmar Ratassepp, **202500 Valga,** Komsomoli 3-1
Dez. interŝanĝi esperantaĵojn kontraŭ gazeto en jida lingvo. H. L. Branzburg, **188260 Luga,** Leningrada regiono, str. Gornaja 13, kv. 4
Koresp. esperante, angle, interŝ. bk. Vitalij Makurin **Krupskaja 13, Kusa** čeliabinskaja obl. 456930
Dez. koresp. Irena Daraganaite, Prano, **232015 Vilnius,** Raud. Armijos pr. 19-6
Instruisto de germana lingvo kun kolegoj el la tuta mondo, interŝ. librojn, spertojn kaj opiniojn, Ivan Kulakov, 37 jara, **Voronej-28,** Irkutskaja 21, kv. 28

KORESPONDDEZIROJ

ĈSSR

Lernanto, 19-jara, pri ĉiutaga vivo, literaturo, Jindrich Plšek, Na Zavadilce 625, **55101 Jaromer III**

Du knaboj, 23-jaraj, serĉas du fraŭlinojn por vojaĝi tra GDR, Pavel Šnajdr, Pravaznická kolekt. dum VZKG, **705 00 Ostrava 5**

Dez. koresp. germane kaj esperante 18-jara ekonomika studentino, Miroslava Cisarová, Nepomucká 21-317, **04 Plzen**

Francio

Profesorino pri matematiko, 23 jara, membro de franca pacmovado kaj de kom. partio, tre interesiĝas pri socialismaj landoj. Dez. koresp. kun juna germán(in)o pri politiko, paco, kulturo, turismo ktp. Francoise Crépel, 16 A bd Alexis Carrel, **35000 Rennes**

GDR

Junulo, 18 jara, kun fraŭlino el GDR aŭ eksterlando pri ĉiuj temoj en Esperanto. Peter Bartos, **402 Halle,** Rigaer Str. 3/35

Lernantino, 16 jara, tutmonde pri ĉiuj temoj, precipe pri naturscienco kaj moderna muziko. Eva Wolf, **DDR - 99 Plauen,** Hartmannstraße 12

Hungario

Pionirino, 14 jara, esperante, ruse pri literaturo, kol. bk, insignojn Eva Szabó, **3373 Besenyötelek,** Altalanos Iskola, Vöröshadsereg ut. 96

Lernanto, 17 jara, dez. koresp. kun 15—18 jaraj knabinoj. Tibor Howath, **H-9961 Rabagyannat,** Fö u 95/a

Knabino, 14 jara, dez. koresp. kun knabo 15—16 jara. Suzana Hartmann, **H-7754 Boly,** Fay u. 8

Knabo, 16 jara, dez. koresp. kun junaj germanaj knabinoj, kol. bk. Laslo Forgarasi, **4551 Oros,** Vasvario str. 7

Elektromuntista lernanto, 17 jara, kol. pm, lernas ludi tamburon. Laszlo Szabo, **Budapest 1157,** Erdökerülö u 33

Dez. koresp. Gabor Jozsef, **6301 Kalocs,** Pf. 12

Lernanto, 17 jara, dez. koresp. kun germanaj knabinoj, Bucsi Andor, **4090 Polgar,** Tasko ut. 150

Hungara fandista brigado serĉas korespondadon kun sama brigado en GDR kaj aliaj socialismaj landoj. Skribu al: Béke-(Paco)brigado en la fabriko 4a Aprilo, Budafoki str., **Budapest XI,** Hungario

Japanio

Docento pri germanistiko, fraŭlo, 31 jara, dez. korespondi kun geamikoj el GDR esperante kaj germane pri literaturo, lingvoj, popola vivo, planas viziti GDR studcele. Akira Morita, **890 Kagoshima-shi,** Kamoike-chĝ 201, Kagoshima Gaigaku, Kyôyôbu

Nederlando

Komencanto, 18 jara, kun komencanto proksimume samaĝa el Berlin. P. Alexander Stornel, Makerbloemstraße 24, Schiebrock **Rotterdam**

Pollando

Estraro de lernejo deziras rilatojn kun geesperantistoj de Supera Instruista Lernejo en Halle. Skribu al MKE-„Tamen-73" ZW SZSP **Bialystok 15-872,** ul. Dabrowskiego 1

Konstruteknikistino, 25 jara, en Esperanto, germane kaj ruse pri literaturo, muziko, arkitekturo, turismo, dez. interŝ. pm, bk, diapozitivojn. Jadwiga Holeniewska, **59-220 Legnica,** ul. Parkowa 51/6, woj. Wroclaw

Lernantino, 17 jara, en Esperanto, pole, ruse, france, Hanna Popien, **64-205 Jablonna,** K. N. Tomysla 140

Knabino 17 jara, dez. koresp. kun GDR-anoj. Ewa Sominska, **27-600 Sandomierz,** ul. T. Kosciuszki 1m 9

18 jara, pri muziko, vojaĝoj germane, ruse, angle. Bozena Zastawna, ul. Mlodowskiej 17/1, **22-100 Chelm-Lubelski**

Metalmetiisto, 33 jara kun 29-jara edzino kaj 4-jara filo dez. amikiĝi kun germana edziĝparo. Tadeusz Piotrowski, **44-101 Gliwice,** poŝtkesto 160

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60. Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Willi Vildebrand. - Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
III-12-8 143